# ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ◆ Esperantobladet ◆ kesäkuu ◆ junio ◆ 3/2025




## Aŭtunaj Tagoj Tampere – Syyspäivät Tampere 27.–28.9.2025, p. 8–11

◆ Puheenjohtajalta – De la prezidanto, p. 3–4

◆ Kesäkurssi – Somera kurso, 5.–8.6.2025
Hämeenlinna, p. 11–14

# ESPERANTOLEHTI

**Esperanta Finnlando ◆ Esperantobladet** ISSN: 0787-8206

Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.
Organ för Esperantoförbundet i Finland. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.
Perustettu/Grundad/Fondita 1907. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.
Finna Esperantisto 1907–1914, Esperanta Finnlando 1918–23, 1948–53, 1959–1987.
Ilmestyy neljä kertaa vuodessa. Utkommer fyra gånger i året. Aperas kvarfoje jare.
Tekstit ja kuvat lainattavissa Suomen Esperantoliiton (EAF) tai tekijän luvalla. Lähde mainittava.
För att använda verket behövs tillstånd av Esperantoförbundet (EAF) eller av upphovspersonen.
Källan ska anges. Tekstojn kaj bildojn oni rajtas reuzi nur kun permeso de la redakcio (EAF) aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

**Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo**: 💻 *eaf@esperanto.fi*
Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Juha Metsäkallas*
Toimitussihteeri/Redaktionssekreterare/Redakta sekretario: *Tiina Oittinen*
Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Maj-Lis Krouvi* 💻 *maj-lis@maisanpaja.info*

**Tilaushinta/Prenumerationspris/Abonprezo:** 25 €/vuosi/år/jaro
Jäsenhinnat: katso jäsenyhdistykset-sivu/ Por membroj: rigardu la antaŭlastan paĝon

**Tilaukset, osoitteenmuutokset/ Prenumerationer, adressförändringar/Abonoj, adresŝanĝoj:**
Suomen Esperantoliitto 💻 *eaf@esperanto.fi*

**Pankkitili/Bankkonto:** FI82 5721 1520 2859 38 OKOYFIHH.

**Julkaisija/Utgivare/Eldonanto:** Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.
**Kansi/Pärm/Kovrile:** *Rodica Todor* kaj *Jukka Laaksonen* ĉe la Esperanto-arbo en Tampere.
*Rodica ja Jukka Esperanto-koivun luona Tampereen Sorsapuistossa*. Foto: TO.

## Esperanto-Asocio de Finnlando ◆ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

**Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande:** *Juha Metsäkallas*
Turku, 💻 *eafprezidanto@esperanto.fi*
**Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande:** *Paula Niinikorpi*
Pori, 💻 *paula.niinikorpi@gmail.com*
**Sekretario/Sihteeri/Sekreterare:** *Tiina Oittinen*
Turku, ☎ 050 549 4709 💻 *eafsekretario@esperanto.fi*

**Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:**
*Tuomo Grundström*, Rauma, ☎ 0440 199 766 💻 *tuomo.grundstrom@gmail.com*
*Tiina Kosunen*, Espoo, ☎ 044 576 3314 💻 *eafkasisto@esperanto.fi*
*Arja Kuhanen*, Tammela, 💻 *kuhanenarja@gmail.com*
*Päivi Saarinen,* Helsinki, ☎ 050 490 0154 💻 *paivi.saarinen@iki.fi*
**Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:**
*Leila Tiitto*, Oulu, 💻 *leila.a.tiitto@gmail.com*
*Robert Bogenschneider,* Pori 💻 *brilanto@gmail.com*
*Jukka Laaksonen,* Tampere, 💻 *jvaleto@kolumbus.fi*

**Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör:** *Tiina Kosunen*
Espoo, ☎ 044 576 3314 💻 *eafkasisto@esperanto.fi*
**Pankkitili/Bankkonto (EAF):** katso yllä, vidu supren, se ovan

**Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:**
FI57 1815 2913 6360 14, NDEAFIHH
UEA/EAF/ILEI *Tiina Kosunen* ☎ 044 576 3314 💻 *cefdelegito@esperanto.fi*

**Internet**: *www.esperanto.fi* ◆ *www.facebook.com/Finnlando*

# Me sallimme kansanmurhan



Natseja Yhdysvaltoihin paennut puolanjuutalainen oikeustieteilijä Raphael Lemkin (puolaksi Rafał Lemkin) julkaisi vuonna 1944 teoksen nimeltä *Axis Rule in Occupied Europe*, jossa hän käytti keksimäänsä sanaa *genocide*. Sana on yhdistelmä kreikkaa ja latinaa: *γένος, génos*, suomeksi ”syntyperä, suku, kansa” ja *caedere*, suomeksi ”hakata maahan, surmata, tuhota”. Käsitteellä Lemkin halusi kuvata järjestelmällistä ihmisten tuhoamista. Esikuvina hän piti armenialaisten kansanmurhaan vuosina 1914–18 sekä teoksen kirjoittamisen aikoihin tapahtunutta juutalaisten kansanmurhaa, holokaustia.

Lemkin halusi kansainvälisen oikeuden käsitteen, joka olisi laajasti kattanut rikokset poliittisista, uskonnollisista, rodullisista ym. syistä kokonaisia ihmisryhmiä vastaan. Lopulliseen Yhdistyneiden kansakuntien yleiskokoukseen vuonna 1948 hyväksymään *Yleissopimukseen joukkotuhontana pidettävän rikoksen ehkäisemiseksi ja rankaisemiseksi* (ns. *Genocide Convention*) eivät kuitenkaan mahtuneet rikokset poliittisia tai kielellisiä ryhmiä vastaan. Rajauksen takana oli politiikka.

Politiikka on vahvasti vaikuttanut myös siihen, mitä kansanryhmiin kohdistuneita hirmutekoja on pidetty tai pidetään joukkotuhontana.

Israelin toimia palestiinalaisia kohtaan on tutkittu useaan kertaan. Israel teki suurhyökkäyksen Gazaan vuodenvaihteessa 2008–2009. Tuolloin surmansa sai yli tuhat palestiinalaista siviiliä. YK:n ihmisoikeuskomission asettama tutkimuskomissio totesi, että Israelin armeija ”kohdisti hyökkäyksiä suoraan palestiinalaisiin siviileihin ja tappoi heitä mielivaltaisesti” ja noudatti ”tarkoituksellista ja järjestelmällistä käytäntöä kohdistaa hyökkäyksiä teollisuuslaitoksiin ja vesi-infrastruktuuriin”.

Israelin seuraava suurhyökkäys tapahtui vuonna 2014, ja tuolloin kuoli arviolta jopa vajaat 2000 siviiliä. Kansainvälisen rikostuomioistuimen tutkinta tapahtumista taitaa vielä olla kesken.

Islamilainen vastarintaliike, paremmin tunnettu arabiankielisen nimensä lyhyellä muodolla Hamas, hyökkäsi Israeliin lokakuussa 2023, ja käydyissä taisteluissa sai surmansa jopa 1100 israelilaista ja ulkomaista siviiliä, joiden lisäksi Hamas otti reilut 240 panttivankia. Hyökkäystä seuranneissa Israelin armeijan toimissa on tähän päivään mennessä saanut surmansa varovaistenkin arvioiden mukaan yli 40 000 ihmistä (joissakin arviossa kuolleiden määräksi arvioidaan jopa 70 000), joukossa luultavasti lukuisia mainittuja panttivankeja – eikä tappaminen ole loppumassa, sillä Gaza on tällä hetkellä hiekan keskellä oleva rauniokasa, jota Israel näännyttää hengiltä estämällä YK:n avustukset.

Siinä missä monet itseään demokratian soihtuina pitävät maat ovat olleet vähintäänkin haluttomia tuomitsemaan Israelia, apartheidista aikoinaan kärsinyt Etelä-Afrikka on osoittanut moraalista suoraselkäisyyttä nostaessaan jo vuoden 2023 lopulla kanteen Kansainvälisessä rikostuomioistuimessa Israelia vastaan syyttäen tätä kansanmurhasta Gazassa. Myöhemmin ainakin Espanja on liittynyt syytteeseen. Tuomioistuin on antanut lukuisia välipäätöksiä, joiden keskeinen sisältö on, että Israelin on tehtävä kaikkensa välttääkseen kansanmurhan kaltaiset toimet Gazassa. Kuten on saattanut odottaa, nämä eivät ole vaikuttaneet Israelin toimiin mitenkään.

Päinvastoin Israel on hyökännyt Gazan lisäksi Länsirannalle, Libanoniin sekä Syyriaan ja viimeisimpänä nyt Iraniin, jonne tehtyä “ennakoivaa iskua” Israelin pääministeri Benjamin Netanjahu on puolustellut sanakääntein, jotka muistuttavat Vladimir Putinin perusteluita, miksi Ukrainaan piti hyökätä. Jättämällä tuomitsematta Israelin me ensimmäisen maailman asukkaat tuomme itse julki sen, mistä globaali etelä meitä syyttää: meillä on kaksoisstandardit Venäjälle ja Israelille. Miksi Venäjän hyökkäys tuomitaan, muttei Israelin hyökkäyksiä?

*Juha Metsäkallas*

▶▶

# Ni permesas genocidon

La pola-juda juristo *Raphael Lemkin* (pole Rafał Lemkin), kiu fuĝis de nazioj al Usono, publikigis en 1944 verkon titolitan *Axis Rule in Occupied Europe*, en kiu li uzis la vorton genocido, kiun li mem elpensis. La vorto estas kombinaĵo de la greka kaj latina: *γένος, génos*, esperante ”deveno, gento, popolo” kaj *caedere*, esperante ”haki teren, mortigi, detrui”. Per la koncepto Lemkin volis priskribi la sisteman detruon de homoj. Kiel modelojn li rigardis la armenan amasmurdon en 1914–18 kaj la amasmurdon de judoj, la holokaŭston, kiu okazis dum la verkado de la verko.

Lemkin volis internacian juran koncepton, kiu amplekse kovrus krimojn pro politikaj, religiaj, rasaj k.s. kialoj kontraŭ tutaj homgrupoj. Tamen en la fina versio de *Konvencio pri la prevento kaj punado de la krimo genocido* (la tiel nomata *Konvencio pri genocido*), aprobita de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj en 1948, ne estis inkluditaj krimoj kontraŭ politikaj aŭ lingvaj grupoj. Malantaŭ tiu limigo estis politiko.

Politiko forte influis ankaŭ tion, kiujn krimojn kontraŭ homgrupoj oni rigardis aŭ rigardas kiel genocidon.

La agoj de Israelo kontraŭ palestinanoj estas plurfoje esploritaj. Israelo faris grandan atakon kontraŭ Gazao fine de la jaro 2008, komence de 2009. Tiam pli ol mil palestinaj civiluloj pereis. La esplorkomisiono starigita de la Komitato pri homaj rajtoj de UN konstatis, ke la israela armeo ”rekte celis atakojn al palestinaj civiluloj kaj arbitre mortigis ilin” kaj sekvis ”intencan kaj sisteman praktikon celi atakojn al industriaj instalaĵoj kaj akva infrastrukturo”.

La sekva granda atako de Israelo okazis en 2014, kaj tiam pereis takse preskaŭ 2000 civiluloj. La enketado de la Internacia puna kortumo pri tiuj eventoj ŝajnas ankoraŭ esti nefinita.

La islama rezistmovado, pli bone konata sub la mallonga formo de sia arablingva nomo Hamaso, atakis Israelon en oktobro 2023, kaj en la bataloj pereis ĝis 1100 israelaj kaj eksterlandaj civiluloj, kaj plie Hamaso kaptis pli ol 240 ostaĝojn. En la postaj agoj de la israela armeo, ĝis hodiaŭ, laŭ eĉ la plej konservativaj taksoj, pli ol 40 000 homoj (en kelkaj taksoj la nombro de mortintoj estas taksata ĝis 70 000) pereis, inter ili verŝajne multaj el la menciitaj ostaĝoj – kaj la mortigado ne ĉesos, ĉar Gazao estas nuntempe ruinaro meze de la sablo, kiun ruinaron Israelo elĉerpas ĝismorte blokante UN-helpon.

Dum la pluraj landoj, kiuj konsideras sin ”torĉoj de demokratio”, estis almenaŭ malvolontaj kondamni Israelon, Sud-Afriko, kiu iam suferis pro apartismo, montris moralan honestecon, procesante jam fine de 2023 kontraŭ Israelo ĉe la Internacia puna kortumo, akuzante ĝin je genocido en Gazao. Poste almenaŭ Hispanio aliĝis al la akuzo. La kortumo eldonis multajn provizorajn decidojn, kies esenca enhavo estas, ke Israelo devas fari ĉion eblan por eviti genocidajn agojn en Gazao. Tute nesurprize tiuj neniel influis la agojn de Israelo.

Kontraŭe krom Gazaon Israelo atakis Cisjordanion, Libanonon kaj Sirion, kaj plej laste nun Iranon. Tiun lastan atakon, “preventan atakon”, la israela ĉefministro *Benjamin Netanjahu* defendis per vortoj, kiuj memorigas la argumentojn de *Vladimir Putin* pri la kialo, kial Rusio devis ataki Ukrainion. Ne kondamnante Israelon ni loĝantoj de la unua mondo mem malkaŝas tion, pri kio la tutmonda sudo akuzas nin: ni havas duoblajn normojn por Rusio kaj Israelo. Kial la atako de Rusio estas kondamnita, sed ne la atakoj de Israelo?

*Juha Metsäkallas*

# EAF informas – Liitto tiedottaa

## Ĝenerala kunveno pri statutŝanĝo 14.6.2025

La ĝeneralan kunvenon la 14-an de junio 2025 en *Helsinki* partoprenis 11 membroj de Esperanto-Asocio de Finnlando (EAF). La sola afero estis dua pritrakto de la statutŝanĝo, kiun jam la jarkunveno en Raŭmo akceptis. Ankaŭ la ĝenerala kunveno akceptis la proponitajn statutojn kaj tiel la estraro ricevis rajton antaŭenigi kaj sendi la novan statuttekston al *Patentti- ja rekisterihallitus* (PRH, registrejo por ia. organizoj, entreprenoj, patentoj) por konfirmo. Post tio la Asocio havos novan statuton. Membroj ricevos informon retpoŝte.

*Suomen Esperantoliiton (EAF) yleiskokous 14.6.2025 pidettiin Helsingissä. Kokouksessa käsiteltiin toisen kerran hallituksen sääntömuutosehdotus, jonka vuosikokous hyväksyi Raumalla 22.3.2025. Yleiskokous hyväksyi sääntömuutosehdotuksen. Kun Patentti- ja rekisterihallituksen varmistus uusille säännöille on saatu, ne astuvat voimaan ja siitä tiedotetaan jäsenistölle sähköpostilla.*

## Suplemento de Esperantolehti – Esperantobladet – Esperanta Finnlando

Komence de oktobro post la Aŭtunaj Tagoj aperos denove PDF-forma suplemento (aldonaĵo) de nia membrogazeto kaj organo. Ĝi estos sendita al ĉiuj abonantoj, kiuj havas retpoŝton kaj ankaŭ al niaj kunlaborantoj en Finnlando kaj eksterlande. La suplemento en PDF-formo estos multkolora kaj la grandeco sur la ekrano estos pli granda ol tiu de la nigra-blanka gazeto. En PDF-formo eblas publikigi pli longajn artikolojn kaj pliajn, kolorajn fotojn. La numero traktas ĝeneralajn temojn, eventojn kaj fenomenojn en Esperantujo. Pri decidoj de EAF ni informas en la papera gazeto kaj en retpoŝtaj membroleteroj.

Redaktofino por la suplemento estos 30.9.2025, tuj post la Aŭtunaj Tagoj.

*Esperantolehden lisäjulkaisu ilmestyy taas lokakuun alussa. Se lähetetään kaikille tilaajille, joilla on sähköposti. Lisäksi se menee myös yhteistyökumppaneille Suomessa ja ulkomailla. Lisäjulkaisu on monivärinen ja sen koko näytöllä on suurempi kuin mustavalkoisen lehden. PDF-muodossa on mahdollista julkaista pitempiä juttuja ja useampia värillisiä kuvia. Julkaisun sisältö koostuu yleisistä asioista ja esperantomaailman erilaisista tapahtumista ja ilmiöistä. Liiton päätöksistä ilmoitamme paperilehdessä sekä jäsenistölle lisäksi sähköpostitse. Aineistopäivä lisäjulkaisun jutuille on 30.9.2025, siis heti syyspäivien jälkeen. Jutut osoitteeseen eaf@esperanto.fi.*

## Esperantolehti surpapere, kiel PDF aŭ ambaŭ

Dum kelkaj jaroj Esperantolehti aperas kaj surpapere kaj kiel PDF. Ambaŭ estas senditaj per la sama kotizo al abonantoj. Kelkaj abonantoj tamen ne havas retpoŝtan adreson kaj tial ricevas nur la paperan version. Paperajn versiojn ricevas aŭ abonas ankaŭ kelkaj bibliotekoj kaj kunlaborantoj en Finnlando. Sekvan fojon estos presita la numero 4/2025 kaj antaŭ ĝia apero, ni sendos al abonantoj per retpoŝto enketon pri tio, ĉu ili deziras havi kaj la paperan kaj la PDF-forman gazeton. Ni volonte sendos ambaŭ, sed estus bone scii pri ekzaktaj deziroj de la abonantoj.

*Olemme nyt muutaman vuoden ajan tehneet Esperantolehdestä paperilehden lisäksi myös PDF-version, jonka lähetämme sähköpostiosoitteensa ilmoittaneille lehden tilanneille jäsenille. Paperilehteä painatamme noin 150 kappaletta, sitä menee myös joidenkin kirjastojen lukusaleihin Suomessa. Kaikki eivät ole*

▸▸

*ilmoittaneet sähköpostiosoitettaan, ehkä kaikilla ei edes ole sellaista. Jotkut ovat puolestaan ilmoittaneet, etteivät halua ollenkaan painettua lehteä. Seuraavaksi ilmestyy painettuna numero 4/2025 ja sitä ennen lähetämme tilaajille sähköpostilla tiedustelun, jossa kysytään haluatko lehden sekä paperisena että PDF-muodossa. Kaikki mahdollisuudet käyvät meille, toivomme vain tietoa siitä, millaisen lehden jäsenemme haluavat.*

### Eventoj de EAF 2025

Aŭtunaj Tagoj okazos fine de septembro, legu pli sur paĝoj 8–11. Dum julio-aŭgusto la membrosocietoj kaj aliaj grupoj havos renkontiĝojn kiel kutime, ili pli vigliĝas en septembro. Retaj renkontiĝoj, *Babilado*, okazos laŭ eblecoj en ĉiu monato. En decembro ni memoras Zamenhof-tagon kaj havos ankaŭ julajn festetojn de la membrosocietoj kaj aliaj grupoj. Bonvole faru proponojn, kie vin interesus kunveni en venontjaraj Vintraj kaj Aŭtunaj Tagoj kaj ankaŭ en la Somera kurso.

Informojn EAF sendas tra retpoŝto aŭ tra tujmesaĝiloj. Ne hezitu kontakti nin ankaŭ alimaniere, kontakinformojn de estraranoj vi trovas sur paĝo 2.

*Syyspäivät ovat Tampereella, lue lisää sivuilta 8–11. Kesällä yhdistyselämä on ehkä hieman hiljaisempaa, mutta monet seurat tapaavat säännöllisesti. Syyskuussa käynnistyy taas tavanomainen toiminta. Liiton Babilado-verkkotapaamiset jatkuvat noin kerran kuukaudessa tilanteen mukaan, tiedote tulee sähköpostilla. Joulukuussa on taas aika muistaa Zamenhof-päivää ja viettää pikkujouluja. Odotamme kaikilta ehdotuksia talvi- ja syyspäivien sekä kesäkurssin tapahtumapaikoiksi.*

*Liitto ja jäsenyhdistykset lähettävät tiedotteita sähköpostilla ja pikaviestimillä. Yhteyttä voit toki ottaa muullakin tavalla. Liiton hallituksen jäsenten tiedot ovat sivulla 2, jäsenyhdistysten takakannen sisäsivulla.*

*La estraro de Esperanto-Asocio de Finnlando (EAF)*
*Suomen Esperantoliiton hallitus*

## Esperanto-klubo de Helsinki informas

La kafejaj renkontiĝoj de Esperanto-klubo de Helsinki (EKH):

**En julio:** Sabaton 19.7. ni promenos ĉirkaŭ la golfon de *Töölönlahti*. La promeno komenciĝos je 14:00 en la Civitana placo *(Kansalaistori)* apud la enirejo de la biblioteko *Oodi*. De tie ni promenos norden, preter Finlandia-domon kaj la Nacian Operejon. Ni vidos ankaŭ la urban rozĝardenon (parto de *Talvipuutarha*). La ekskurso finiĝos en la kafejo *Sinisen huvilan kahvila*, de kie estas nur mallonga promenado reen al la Civitana placo.

**En aŭgusto:** Sabaton 9.8. *Konatiĝo kun kvar skulptaĵoj pri Tove* en la tago de *Tove Jansson*. Ekiro je 14:00. Pliaj informoj aperos en nia retejo fine de julio.

Vi estas ĉiuj bonvenaj partopreni en la renkontiĝoj. Pro eblaj ŝanĝoj, sekvu informojn en nia retejo: *esperantohelsinki.wordpress.com*.

*Tervetuloa tapaamisiin myös ne, jotka ovat vasta tutustuneet esperantoon. Lisätietoja Helsingin Esperantoseuran verkkosivulta esperantohelsinki.wordpress.com*

*Yhteyshenkilö Päivi Saarinen (ks. tiedot sivulta 2).*

Notu ke pri nia junia ekskurso al *Suomenlinna* vi povas legi la artikolon *La ekzotika plantvivo en Suomenlinna*. La artikolo aperis en Finna Babilejo, ligilo ankaŭ en nia retejo.

# Esperantoklubo de Oulu informas

Saluton!
Nia oŭlua grupeto kunvenas la lastan sabaton de ĉiu monato je la 13-a horo en la biblioteko de *Karjasilta*. Pro ŝlosita pordo, bonvolu informi nin antaŭe, sendu tekstmesaĝon al 040 8329075. Bonvenon!

*Eli sama suomeksi:*
*Oulu-ryhmä kokoontuu joka kuun viimeinen lauantai klo 13 Karjasillan kirjastossa. Kirjaston ovi on lukittu, joten kannattaa ilmoittaa tulosta etukäteen, mieluiten tekstarilla minulle. Tervetulua!*

*Leila Tiitto*

# Esperanto-societo Antaŭen informas – *Antaŭen tiedottaa*

Bonvenon al Tampere kaj al niaj renkontiĝoj kaj al Aŭtunaj Tagoj en septembro!

En **julio-aŭgusto** ni renkontiĝos en *Bistro Venla, Kauppakatu 6*, *Tampere*
ĵaŭde 10.7., 24.7., 7.8., 21.8. je la 13-a horo.

Niaj **aŭtunaj** renkontiĝoj okazos ekde septembro ĵaŭde je 13−15 en *Kulttuuritalo Laikku*, en la ĉambro *Mäkelän kabinetti*, 3-a etaĝo:
18.9., 16.10., 13.11., 27.11. (elektokunveno) kaj 11.12.

Por viziti, bonvolu informi pri via alveno al *Raimo* aŭ *Sylvia*.

*Tervetuloa kesän tapaamisiimme ja myös liiton syyspäiville Tampereelle!*

*Heinä−elokuussa tapaamispaikkamme on Bistro Venla, Kauppakatu 6,*
*torstaisin 10.7., 24.7., 7.8., 21.8. klo 13.00.*

*Syksyllä tapaamme edelleen Kulttuuritalo Laikussa, Mäkelän kabinetissa 3. kerros torstaisin klo 13−15: 18.9., 16.10., 13.11., 27.11. (vaalikokous) ja 11.12.*

*Olet tervetullut vierailemaan, mutta ilmoita tulostasi etukäteen Raimolle tai Sylvialle.*
*raimo.tuisku@saunalahti.fi tai*
*sylvia.h@kolumbus.fi, tel: 050 321 4313.*

*Estraro de Antaŭen ja kaikki antaŭenilaiset*

# Esperanto-societo en Turku informas

Niaj semajnaj renkontoj en julio-aŭgusto okazos inter la 17.00 kaj 19.00 plej ofte en ĵaŭdo, sed la tago povas varii. La renkontejo estas iu el la kafejoj de Turku, en la urbocentro ambaŭflanke de la rivero. Se vi venos al Turku pro iu ajn kialo, bonvolu informiĝi ĉe EST-eventokalendaro de la *Finna Babilejo* aŭ demandu de ni la aktualajn, ekzaktajn sciojn pri niaj renkontoj.

*Turun Esperanto-yhdistyksen viikkotapaamiset jatkuvat myös heinä-elokuussa klo 17-19, mutta päivä ei aina ole torstai. Olemme jossain Turun keskustan kahvilassa, jommallakummalla puolella jokea. Ota siis yhteyttä, jos olet tulossa Turkuun. Näet tiedot myös Finna Babilejon tapahtumakalenterista nimeltä EST-eventokalendaro, mutta varmista sen lisäksi myös sähköpostilla tai puhelimitse. Tervetuloa!*

*Por EST-anoj, Tiina Oittinen*
*(kontaktoscioj p. 15, yhteystiedot s. 15,)*

# Aŭtunaj Tagoj Tampere – Syyspäivät Tampere 27.–28.9.2025

## Renkontejoj: Tampere-talo, Kulttuuritalo Laikku, muzeoj en la urbocentro

## Programo – Ohjelma (ŝanĝoj eblas – muutokset mahdollisia)

**Vendredo / Perjantai 26.9.2025**

18.00–20.00...... Vespera renkontiĝo al frualvenintoj en konvena loko. Iltatapaaminen jo perjantaina saapuville.

**Sabato / Lauantai, 27.9.2025**

8.00–10.00........ Matenmanĝo en la hotelo por tranoktantoj. *Aamiainen hotellissa yöpyville*.

10.00–12.30...... ***Tampere-talo (Tampere-halo), Yliopistonkatu 55***
Antaŭ la rondirado en Tampere-halo eblas vizito ekzemple en Muminmuzeo kaj/aŭ tagmanĝeto en la loka restoracio. Renkonto ĉe la ĉefa pordo je 12.45. Malfermo de la Tagoj. *Ennen tutustumista Tampere-taloon voit käydä omakustanteisesti talossa olevassa Muumimuseossa ja/tai nauttia valintasi mukaan jotain talon ravintolassa. Tapaaminen pääovella klo 12.45. Päivien avaus.*

13.00–14.00...... Rondirado kun ĉiĉerono en Tampere-halo (ĉefe finnlingve). Tutustuminen Tampere-taloon talon oppaan johdolla.

14.30–15.00...... Vizito ĉe la Esperanto-arbo en la parko *Sorsapuisto* apud Tampere-halo. *Käynti Esperanto-koivun luona Sorsapuistossa, Tampere-talon vieressä.*

15.00–15.30...... Komuna aŭ memstara irado de Tampere-halo al Kulturdomo *Laikku. Siirtyminen Tampere-talolta Kulttuuritalo Laikkuun, ryhmissä tai omatoimisesti.*

15.30–17.45...... ***Kulttuuritalo,* kulturdomo *Laikku, Keskustori 4***
Prelegeto kun memoroj pri la 80-a UK en Tampere, gvidas *Jukka Laaksonen.Luento ja muisteluja Esperanton maailmankongressista Tampereella kesällä 1995.* Kun kafopaŭzo kaj libroservo. *Välissä kahvitauko ja kirjamyyntiä.*

18.00–19.00...... Libera tempo. *Vapaa-aikaa.*

19.30–21.30...... Vespermanĝo en la restoracio *Ukko-Metso*, proprakoste. *Illallinen esim. ravintola Ukko-Metsossa (omakustanteinen).*

**Dimanĉo / Sunnuntai, 28.9.2025**

Matenmanĝo en la hotelo por tranoktantoj. *Aamiainen hotellissa yöpyville.*

10.30–12.30...... Kolektiĝo en *Keskustori*, antaŭ la malnova preĝejo. Jukka Laaksonen gvidos nin kaj rakontos kiel ekestis la industrio en Tampere (*Finlayson, Tampella, Frenckell* k.a.). Fine vizito al la laborista muzeo *Werstas* (senpaga). *Kokoontuminen Keskustorilla, Vanhan kirkon edessä. Jukka Laaksonen kertoo Tampereen kasvusta teollisuuskaupungiksi. Lopuksi museokäynti: Werstas, työväenmuseo*

13.00–14.30...... Komuna tagmanĝo en interkonsentata restoracio, proprakoste. Fermo de la Tagoj. *Päättäjäiset ja lounas sovitussa ravintolassa (omakustanteinen).*

Aŭtunaj Tagoj okazas ĉi-aŭtune en la urbo de multaj memoroj al ni esperantistoj en Finnlando. Se vi ne mem partoprenis *la 80-an Universalan Kongreson en Tampereo* antaŭ tridek jaroj, vi certe multege aŭdis pri ĝi. Temis pri la tria UK en Finnlando, kies partoprennombro estis ĉirkaŭ 2500. La kongresaj tagoj estis de la 23-a ĝis la 29-a de julio en 1995. Antaŭkongreso okazis en *Turku* kaj ankaŭ dumkongresaj kaj postkongresaj ekskursoj estis pluraj.

Dum AT-semajnfino, la 27-an kaj 28-an de septembro 2025, ni havas eblecon konatiĝi kun la tiama kongresejo, *Tampere-talo (Tampere-halo)*. Ni komencos la rondiradon en la enireja halo kaj vidos la artaĵojn, kiuj jam tiam staris tie. Ni vizitos kaj la grandajn salonojn kaj aliajn pli malgrandajn ĉambrojn, kie ĉio okazis dum la kongresa semajno. Nin gvidos dum la rondirado oficisto el Tampere-talo, kiu rakontos al ni ankaŭ kiel la domo ŝanĝiĝis dum la jaroj.

Post vizito en Tampere-talo ni iros al la apuda parko *Sorsapuisto*, kie staras *Esperanto-arbo*. Tiu betulo estis plantita en la parko dum la kongresa semajno. Ni aŭdos surloke pli detale pri ĝia historio. Kaj notu, ke pri la arbo aperis finnlingva artikolo en *Esperantolehti 5/2024*, skribita de *Sylvia Hämäläinen*.

Post la kursotagoj en *Hämeenlinna*, Rodica kaj Tiina pasis du tagojn en Tampere. Kun *Jukka Laaksonen* ili vizitis en Tampere-talo kaj ĉe la Esperanto-arbo. Vidu la bildojn.

Dua parto de la sabata programo okazos en la *Kulturdomo Laikku*, kien ni povos veturi ekzemple per la tramo de Tampere. En la kulturdomo la LKK-prezidanto Jukka Laaksonen rakontos pri la diversaj aferoj kaj eventoj, kiuj ekestis dum la kongresa semajno: ili estis ĉefe pozitivaj kaj eĉ humorplenaj, sed ankaŭ kelkaj tiklaj situacioj. Vi, kiuj kunlaboris kiel kongresejaj volontuloj dum la UK en Tampereo, bonvole rakontu pri viaj spertoj.

La sabatvespero finiĝos per komuna vespermanĝo en loka restoracio.

En dimanĉo ni konatiĝos kun la industria urbo Tampere kaj aŭdos pli pri ĝia ekesto. Ni renkontiĝos sur la placo *Keskustori* kaj daŭrigos sub gvidado de Jukka Laaksonen. Ni finos la rondiradon per vizito en la laborista muzeo *Werstas* kaj havos poste tagmanĝon kun fermo de la Tagoj.




**Kulturdomo Laikku. Foto: TO.**

*Tämän vuoden syyspäivät 27.-28.9. vievät meidät taas Esperanton 80. maailmankongressin tunnelmiin. Sehän järjestettiin Tampereella 23.-29.7.1995 ja osallistujia oli yli 2500 noin 64 maasta. Kongressia edelsi Turun esikongressi ja kongressin aikana sekä sen jälkeen oli useita retkiä. Olette varmaan kaikki kuulleet tästä legendaarisesta kongressista, vaikka ette vielä silloin olleet mukana esperantomaailmassa.*

*Syyspäivien lauantaina 27.9. tutustumme Tampere-taloon monipuolisesti. Aloitamme aulasta, jossa meitä, samoin kuin aikanaan vuoden 1995 kongressin osallistujia, tervehtii Kimmo Kaivannon ympäristö- ja tilateos Sininen suora. Käymme talon oppaan johdolla erikokoisissa saleissa ja muissa tiloissa sekä kuulemme taloon tehdyistä muutoksista.*

*Tampere-talolta menemme viereiseen Sorsapuistoon katsomaan siellä olevaa Esperantopuuta, joka istutettiin puistoon kongressin aikana. Kuulemme silloin tarkemmin koivun vaiheista. Niistä kerrottiin myös Esperantolehdessä 5/2024 Sylvia Hämäläisen kirjoittamassa jutussa.* ▶▶

*Hämeenlinnan kesäkurssin jälkeen Rodica ja Tiina vierailivat Tampereella ja kävivät Jukka Laaksosen kanssa myös Tampere-talossa (ks. kuva). Kansikuvassa Rodica ja Jukka Esperantokoivun luona.*

*Tampere-talolta siirrymme Kulttuuritalo Laikkuun Keskustorin alueella, jonne pääsemme mukavasti esimerkiksi Tampereen ratikalla. Kulttuuritalossa Jukka Laaksonen kertoo meille erilaisista tapahtumista kongressiviikon aikana: vaikka kaikki yleisesti ottaen sujui mainiosti ja kongressin yleisilme oli positiivinen, mukaan mahtui myös tiukkoja tilanteita. Teillä, jotka olitte mukana eri tehtävissä kongressiviikon aikana, on varmaan jokaisella omia muistoja kerrottavana. Juttelua voidaan jatkaa myös yhteisellä illallisella lauantai-iltana.*

*Sunnuntaina tutustumme Tampereen kaupungin ja erityisesti sen teollisuuden syntyyn. Jukka Laaksonen johdattaa meitä Keskustorilta eri kohteisiin. Kävelyn jälkeen vierailemme työväenmuseo Werstaassa (maksuton) sekä menemme vielä päätöslounaalle johonkin läheiseen ravintolaan. Katso tarkempi aikataulu syyspäivien ohjelmasta ja ilmoittaudu tuttuun tapaan verkon lomakkeella tai ottamalla yhteyttä liiton sihteeriin.*



**Tampere-talossa Mira Mäkelän kanssa Tiina, Rodica ja Jukka. Vizito en Tampere-talo en junio. Foto: J-PP.**

*Tervetuloa muistelemaan kanssamme Tampereen kongressin ilmapiiriä!*

Bonvenon denove sperti la kongresan etoson en Tampere! Vin atendas

*Esperanto-Asocio de Finnlando (EAF)*
*Esperanto-societo Antaŭen, Tampere*

## ALIĜILO

Aŭtunaj Tagoj de EAF 27.–28.9.2025 en Tampere

**Bonvolu aliĝi uzante la formularon en nia retejo** *www.esperanto.fi* **(ligilo sendata al membroj de retpoŝto** *eaf@esperanto.fi*). **Vi povas aliĝi ankaŭ retpoŝte aŭ telefone al la sekretario** *Tiina Oittinen*, **vidu p. 2. Ŝi respondas al viaj eventualaj demandoj.**

**Indiku vian nomon, retpoŝtan adreson kaj/aŭ telefonnumeron. Sciigu al ni, se vi havas specialan dieton aŭ aliajn dezirojn. Diru ankaŭ se vi partoprenos en komunaj vizitoj en la muzeoj dimanĉe same kiel tag- kaj vespermanĝoj dum la tagoj, proprakoste, la sekretario faros la rezervon (vidu la programon).**

**Partoprenkotizo (enhavas programon kun gvidadoj en Tampere-talo kaj en la urbo kaj kafon sabate):**
**40 € ĝis 20.8.2025**
**50 € post 20.8.2025**
**55 € por ne-membroj (tutan aliĝperiodon)**

**Pagu al la konto de EAF: FI82 5721 1520 2859 38. Bv. uzi la VT-referencnumeron 4640 (ne skribu aliajn informojn en la pagilon)**

**AT-tranoktado: ĉiu aranĝas mem**
**AT manĝoj: proprakoste, informu pri via deziro partopreni**

*BONVENON!*

### *ILMOITTAUTUMINEN*

*Suomen Esperantoliiton syyspäivät (AT) 27.–28.9.2025 Tampereella.*

*Ilmoittaudu verkkosivujen lomakkeella, johon saat linkin jäsentiedotteessa sähköpostiosoitteesta eaf@esperanto.fi. Ilmoittautua voit myös sähköpostilla tai puhelimitse siht. Tiina Oittiselle, ks s. 2. Tiinalta saat myös tarvittaessa lisätietoja.*

*Ilmoita nimesi, sähköpostiosoitteesi ja/tai puhelinnumerosi sekä mahdolliset erikoisruokavaliot. Kerro myös, jos olet halukas osallistumaan yhteiseen museokäyntiin sunnuntaina sekä ruokailuihin (omakustanteiset), sihteeri tekee varaukset sen mukaan (katso tarkemmin ohjelman kuvauksesta).*

***Osallistumismaksu:** (sis. ohjelmassa mainitut Tampere-talon esittelyn ja kaupunkikävelyt sekä kahvit):*
*40 € 20.8.2025 asti*
*50 € 20.8.2025 jälkeen*
*55 € ei-jäsenille (koko ilmoittautumisajan)*

*Maksa Suomen Esperantoliiton tilille: FI82 5721 1520 2859 38. Käytä viitenumeroa **4640** (ei muita tietoja viite- tai viestikenttään maksun yhteydessä).*

*AT-yöpyminen: jokainen varaa itse*
*AT-ruokailut: ilmoita mihin haluaisit mukaan.*

*TERVETULOA!*

# Kesäkurssi – Somera kurso, 5.–8.6.2025 Hämeenlinna



**Kursanoj en la Wetterhoff-domo dum la prelego de Rodica. Foto: JM.**

Somera kurso de Esperanto-Asocio de Finnlando (EAF) okazis ĉi-jare en nova urbo, *Hämeenlinna*, kaj kun nova ĉefinstruisto, *Rodica Todor* el Rumanio. La finnlanda instruisto estis *Sylvia Hämäläinen*, pri teknikaj aferoj zorgis *Juha Metsäkallas* kaj la kursorespondeculo estis *Tiina Oittinen*. Tiina kaj Juha zorgis ankaŭ laŭbezone pri interpretado en la finnan dum la kurso.

La kursejo *Wetterhoff*-domo situas en la centro de la urbo kaj ni sentis nin varme akceptitaj tie. En kursokomenco la ĉefo de la fondumo *Fredrika Wetterhoff -säätiö* rakontis pri la vivo de la fondinto *Fredrika Wetterhoff* kaj pri la historio de la domo kaj de la fondumo.

Kursanoj estis entute dek tri, el kiuj tri partoprenis distance. De la kursanoj du lernis ĉefe la elementajn aferojn kun Sylvia, la aliaj estis en la progresa lernogrupo de Rodica. Rodica havis abundan materialon pri bazaj aferoj de la lingvo kaj surbaze de tiu ŝi multe kuraĝigis la lernantojn paroli esperante. En sabato ŝi

▶▶

prelegis pri sia lando Rumanio, kaj ĉefe pri la tre mondkonata regiono *Transilvanio*. Krome ni konatiĝis kun ŝia hejmurbo, *Braşov*, kiu situas en la sama regiono. Ni ĉiuj sekvis la prelegon kun granda intereso.

Al la kurso apartenis rondirado en la urbo kaj vizito en la naskiĝdomo-muzeo de la komponisto *Jean Sibelius*. Loka membro de EAF, *Marjatta Niemi,* rakontis pri la historio kaj nuntempo de la urbo Hämeenlinna kaj gvidis nin dum du vesperoj al ĉefaj lokoj. Ni vizitis la parkon, kie eblas aŭskulti komponaĵojn de Sibelius sidante sur benkoj. Apud la parko situas la plej malnova gimnazio-liceo de la urbo, inter kies lernantoj estis multaj en Finnlando konataj personoj; nun la konstruaĵo estas renovigita. Ni vidis ankaŭ la boato-havenon sur la bordo de la bela lagego *Vanajavesi*. La kastelan areon Rodica kaj Tiina povis kun Marjatta viziti en dimanĉo posttagmeze. Koran dankon al vi, Marjatta, kaj ankaŭ koran dankon al *Eila*, kiu helpis nin diversmaniere antaŭ kaj dum la kurso. En sabato ni ricevis vizitantojn el *Pori*, *Paula* kaj *Robert*, kiuj venis sekvi la prelegon de Rodica. Poste ili akompanis nian grupon al ekskurso en urboparto de *Aulanko*. La naturparko tie inspiris kaj inspiras finnlandanojn jam dum pli ol cent jaroj. Ni havis bonsanĉon kun la vetero: kvankam ne estis tre varme, tamen ne pluvis, kaj tiel ni povis bonege piediri kaj en la urbo kaj en la naturparko. En dimanĉo la fermo de la kurso okazis je la tagmezo kaj poste eblis memstara vizito en diversaj lokoj en Hämeenlinna aŭ eĉ en milithistoria muzeo en la apuda municipo *Hattula*. Dankon al ĉiuj partoprenantoj, kiuj alvenis al Hämeenlinna! Kaj dankegon ankaŭ al vi, kiuj malgraŭ kelkaj teknikaj problemoj diligente sekvis kaj partoprenis distance en la kursotagoj. Bonvenon denove al niaj venontaj kursoj!



**Grupbildo de la kursanoj kaj instruistoj. Foto: JM.**

*Esperantoliiton tämän vuotisen kesäkurssin paikkakunta oli Hämeenlinna ja kurssipaikkana Wetterhoffin talo kaupungin keskustassa. Kurssin pääopettaja oli tänä kesänä Rodica Todor Romaniasta ja suomenkielisenä opettajana Sylvia Hämäläinen. Tekniikasta huolehti Juha Metsäkallas, joka yhdessä kurssivastaava Tiina Oittisen kanssa tulkitsi myös tarvittaessa suomesta esperantoon ja toisin päin.*

*Kurssin aluksi Fredrika Wetterhoff -säätiön toiminnanjohtaja Hillevi Kaarlenkaski kertoi meille talon historiasta sekä sen perustajan Fredrika Wetterhoffin vaiheista. Meillä oli opetusta varten käytössä kaksi huonetta, joista toisessa Sylvia opetti kahta alkeiskurssilaista ja toisessa Rodica jatkokurssia. Wetterhoffin talossa saatoimme tutustua myös monipuoliseen käsityömyymälään. Päiväruokailu hoitui kätevästi talon lounaskahvilassa. Kiitos Hilleville ja muille kaikista käytännön järjestelyistä kurssimme aikana.*

*Jatkokurssilla oli yhteensä 11 oppilasta, joista osa oli mukana etäyhteydellä. Rodican monipuolinen kurssimateriaali auttoi kurssilaisia kertaamaan kieliopin asioita, mutta ennen kaikkea hän rohkaisi kaikkia puhumaan esperantoa. Rodica ja Sylvia opettivat myös*

*muutaman tunnin toistensa ryhmiä. Lauantaina Rodica kertoi kotimaastaan, erityisesti Braşov-nimisen kotikaupungistaan. Lisäksi luennon aiheena oli Transsylvanian maakunnan historia sekä henkilöhahmo, joka on tunnettu ympäri maailmaa.*

*Kurssiin kuului myös kiertokävelyjä Hämeenlinnassa sekä vierailu säveltäjä Jean Sibeliuksen syntymäkotimuseossa. Hämeenlinnalainen esperantisti Marjatta Niemi kuljetti meitä pitkin kaupunkia ja kertoi monipuolisesti sen historiasta ja nykypäivästä. Kävimme myös Aulangolla ihailemassa kansallismaisemaa. Kiitos Marjatalle ja myös Eilalle avusta järjestelyissä.*

*Kiitos myös kaikille kurssilla mukana olleille! Tervetuloa uudestaan mukaan niin kursseille kuin muihin tapahtumiin paikan päällä tai etänä.*

*Tiina Oittinen*



**La belvedero en Aulanko. Foto: RB.**

# Pensoj pri la somera Esperanto-staĝo en Hämeenlinna, la urbo de Jean Sibelius

La somera staĝo proponita inter la 5-a kaj la 8-a de junio 2025 en Hämeenlinna de la Esperanto-Asocio de Finnlando, estis por mi neforgesebla sperto.

Komencante de la klasĉambroj kiuj aspektis pli kiel muzeejoj, la teknikaj rimedoj disponigitaj por ke oni povu partopreni ne nur fizike, sed ankaŭ de malproksime (fare de tiuj kiuj ne povis ĉeesti), la horaro kiu ofertis al ni la eblecon interrilati amikece en paŭzoj, la ideo interŝanĝi je certa momento la gelernantojn de la du grupoj: komencantoj kaj progresintoj, la vizitoj sperte ĉiĉeronitaj de loka esperantistino *Marjatta* laŭ la spuroj de la granda finna komponisto *Sibelius*, ĉio estis perfekte organizita kaj kontribuis al ege agrabla etoso dum tiu kelktaga staĝo, tre riĉa je ofertoj.

Kiel instruisto, mi provis instigi la intereson de la gelernatoj pri interagado dum lecionoj por rememori kaj pliriĉigi la vortprovizon kaj bazajn gramatikajn strukturojn, provokis konversaciojn kaj kuraĝigis demandojn por klarigi la ambiguecojn rilate al diversaj gramatikaj aspektoj, sed la ĉefa celo estis la utiligo de Esperanto, kio tamen povas krei malfacilaĵojn eĉ por la plej progresintaj lernantoj de la lingvo, kiuj ne havas okazon ofte praktiki ĝin. Ĉi-flanke kelkaj el la renkontitaj defioj temis pri la malsamaj niveloj de la lingvoscio, kaj tempolimoj por pli profunda studado. Ĉar la partoprenantoj montris sinceran intereson pri daŭrigo de sia lernado, por plifirmigi la akiritajn konojn rekomendo estus konstanta praktikado de Esperanto per retaj renkontiĝoj.

▶▶

Karaj *Sirkka, Ulla, Merja, Eira-Liisa, Marjo, Micaela, Andreas, Aini, Leena, Asta* kaj *Eŭgeno*, mi tutkore dankas vin pro la dediĉo, kiun vi montris dum niaj lecionoj. Koran dankon ankaŭ al *Elina* kaj *Aila*, kiuj ĉefe studis kun la kolegino *Sylvia*. Estis plezuro dividi ĉi tiun lernan kaj evoluigan sperton kune. Mi esperas, ke via intereso por Esperanto kreskos kaj helpos vin konstrui pontojn de komunikado ĉie en Esperantujo.

Specialajn dankojn al *Tiina* kaj *Juha* pro la mirindaj tagoj, kiujn mi pasigis en Finnlando.


Mi esperas revidi vin ĉiujn en aliaj estontaj eventoj!

*Kiitos!*
*Rodica TODOR*

***Noto de la redakcio:** La vorto staĝo estas en la finna täydennyskurssi (laŭ Vilkki-vortaro). En Plena Ilustrita Vortaro estas jena klarigo: Periodo, dum kiu oni ĉeestas novan instruan kurson aŭ ricevas trejnadon al nova ofico: staĝo de Ĉe-instruistoj; staĝo de flegistinoj en hospitalo; fari staĝon en kulturdomo.*

# Erik Lindberg

La esperantisto *Erik Lindberg* mortis la 29-an de aprilo 2025 en *Oulu*. Li naskiĝis la 25-an de junio 1938 en *Pietarsaari*. Li estis prezidanto de la Esperanto-societo de Oulu en 1985 kaj estrarano ankaŭ en la posta jaro. En la jaro 1985 li estis samtempe estrarano de EAF. Lindberg laboris en la firmao *Grönblom Oy*, kiu okupiĝis pri importado de metalaj laboriloj. Pro sia laboro li havis kontaktojn kun Japanio kaj ofte vizitis la landon. El tiuj kontaktoj rezultis kontrakto pri amikeco inter la Esperanto-societoj de Oulu kaj *Takatuki*.



DEKLARO PRI ĜEMELAJ SOCIETOJ

Konfirmante, ke ĉiam kreskas la amikeco kaj solidareco de Esperanto-Societo de Oulu kaj Takatuki-Esperanto-Societo sur samideanaj kunlaboroj,
la subaj subskribintoj, honorinda Erik Lindberg, prezidanto de Esperanto-Societo de Oulu kaj honorinda Nisikawa toyozo, prezidanto de Takatuki-Esperanto-Societo nun deklaras, ke ni, ambaŭ Societoj, estas firme kunligitaj kiel ĝemelaj esperanto-societoj.

Ni kredas, ke niaj ĝemelaj kunlaboroj per esperanto faros belajn fruktojn en la vivo kaj kulturo de finna kaj japana popoloj.

Por atesti pri la Deklaro, ni alfikses niajn signaturojn sur ĉi tiu dokumento en la 11a tago de novembro, 1985 en Urbo Takatuki, Japanio.

Erik Lindberg
Erik Lindberg
por Esperanto-Societo de Oulu,
Finnlando

Toyozo Nisikawa
Nisikawa toyozo
por Takatuki- Esperanto-Societo

**Kontrakto pri amikeco. Ystävyyssopimus. Foto: LT.**

*Oululainen esperantisti Erik Lindberg kuoli 29. huhtikuuta 2025. Hän oli syntynyt 25. kesäkuuta 1938 Pietarsaaressa. Erik Lindberg oli Oulun esperantoseuran puheenjohtaja vuonna 1985 ja johtokunnan jäsen vielä seuraavana vuonna. Vuonna 1985 hän kuului myös Suomen Esperantoliiton (EAF) hallitukseen. Lindberg työskenteli metallityökaluja maahan tuovassa yhtiössä Grönblom Oy. Työnsä puolesta hänellä oli yhteyksiä Japaniin ja hän vieraili usein maassa. Näiden yhteyksien tuloksena syntyi ystävyyssopimus Oulun ja Takatuki esperantoseurojen kesken.*

*Osmo Buller*

# Suomen Esperantoliiton jäsenyhdistykset

**Muutokset ja lisäykset tälle sivulle: Esperantolehti/EAF, s-posti *eaf@esperanto.fi***

Suomen Esperantoliiton jäsenyhdistykset:

- Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki 💻 *www.esperanto.fi/helsinki* *esperanto@bastu.net*
- Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Juustolantie 6 A 2, 73100 Lapinlahti ☎ 0500 813 530 💻 *onni.kuappinen@gmail.com*
- Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry (Aini Vääräniemi), Vääräjärventie 26 B, 93590 Vanhala 💻 *www.esperanto.fi/oulu* *aini.esperanto@gmail.com*
- Esperantoseura Antaŭen r.y. / Esperanto-societo Antaŭen, Tampere 💻 *www.esperanto.fi/grupoj/tampere* *raimo.tuisku@saunalahti.fi* ☎ *050 411 5177*
- Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-Societo en Turku (Tiina Oittinen), 💻 *www.esperanto.fi/grupoj/turku* 💻 *tiina.oittinen@pp.inet.fi* ☎ 050 549 4709
- Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) 💻 *fejo@esperanto.fi*.

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Esperantolehden hinta jäsenille on 16 € tilattuna jäsenyhdistysten kautta. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu on 25 € sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 50 €. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Esperanton harrastajia on myös muun muassa Hämeenlinnassa, Hyvinkäällä, Jyväskylässä, Lahdessa, Maarianhaminassa, Porissa, Raumalla, Salossa ja Taivalkoskella.

Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa Suomen Esperantoliitolta, ks. hallituksen yhteystiedot sivulla 2.

## ESPERANTOLEHTI

**ilmestyy vuonna aperas dum la jaro 2025**

Värillinen lisäjulkaisu PDF-muodossa ilmestyy lokakuussa, aineistopäivä syyskuun loppu.
Kolora suplemento en PDF-formo aperos en oktobro, limdato fine de septembro.

| Nro | Limdato | Aperas |
|---|---|---|
| 4/2025 | 16.11. | en decembro |

### Ilmoitushinnat ◆ Anoncprezoj

| Ulkopuoliset mainostajat / Ekster membraro: | Jäsenet / Membroj: |
|---|---|
| 1/1 sivu/paĝo 100 € | 1/1 sivu/paĝo 50 € |
| 1/2 sivu/paĝo 60 € | 1/2 sivua/paĝo 30 € |
| 1/4 sivu/paĝo 40 € | 1/4 sivua/paĝo 20 € |

Sendu la anoncojn. Lähetä ilmoitukset: *eaf@esperanto.fi*



**Rodica kaj Juha admiras la pejzaĝon en Aulanko. Foto TO.**

## Seuraava numero ◆ Venonta numero

Seuraavaksi ilmestyy PDF-lisäjulkaisu lokakuussa. Aineisto 30.9.2025 mennessä toimitukseen.
Kolora suplemento en PDF-formo aperos en oktobro. Artikoloj ĝis 30.9.2025 al la redakcio.
Osoite/adreso: Esperantolehti/EAF, s-posti/rete: *eaf@esperanto.fi*.

Plusprint, Ulvila 2025